Mèng Hàorán,

# Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda*

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' lageto la surfac'.
Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.
Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de* Mèng Hàorán *(∗689 – †740) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)*

*Mi, Manfred Retzlaff, espernantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann`*. La subtitolo "Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda" signifas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo "Nanting", sopiras je sia amiko Xinda.*

Mèng Hàorán,

# Mountain glow

*tradukita de N. N. 77*

Mountain glow sudden west set
Pond moon gradually east up
Loose hair enjoy evening cool
Open window lie idle spacious
Lotus wind carry scent air
Banboo dew drip clear sound
Wish fetch sound qin pluck
Regret not perceive sound appreciate
Feel this think of old friend
Whole night labour dream think

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de* Mèng Hàorán *(∗689 – †740) en la Anglan de N. N. 77.*

*Arg-995-2009 (2014-04-20 00:34:46)*

*Tiu ĉi laŭvorta angligo troviĝas en* `http://www.chinese-poems.com/m6.html`*.*